Invitilo al komuna programo de Esperantista klubo Brno kaj Esperantista klubo Gliwice

Ni kore invitas vin al sekva komuna programo de du esperantistaj kluboj.

Temo.

Ni estas tio, kion ni manĝas

Ĉu vi sentas, ke vi perdiĝas en la hodiaŭa inundo de nutraj rekomendoj, supernutraĵoj kaj certaj dietoj?

Aŭskultu inspiran prelegon, kiu en komprenebla formo montros al vi, kiel grandan influon havas tio, kion ni ĉiutage metas *sur la pladon*, al nia sano, energio kaj etoso. Kune ni vidos, ke sana manĝado ne devas esti scienco, serio de malpermesoj nek enuo.

Vi ekscios, kiel doni al via korpo la plej bonan, pli bone kompreni la signalojn, kiujn ĝi sendas al ni, kaj fari ion por via sano.

Ĉion ĉi el la buŝo de spertulino pri nutrado – nutra terapeŭtino Květa Krajíčková.

Ni antaŭĝojas vidi vin - ĉar ĉiu povas manĝi feliĉe kaj inteligente!

Kiam: la 18-an de novembro 2026 je **19.00** (UTC+1)

Prelegos: Květa Krajíčková
Lingvo: Esperanto

Kie: La renkontiĝo okazos rete per Zoom

Jen la ligilo: https://polsl-pl.zoom.us/j/93116604802?pwd=MGJzQ0pmeklOMCtYamJUMlA0all2Zz09

Enirkodo: 931 1660 4802

Pasvorto: 235959.

La prelego estos registrata.

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskultilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

★

Ni rekomendas

- La 26-a ĝis 29-a de novembro 2026 7-a Virtuala Kongreso de Esperanto
- La 12an de decembro 2026 Zamenhofa Tago en Vieno

- La 14an — 17an de majo 2027 La Eŭropa Kongreso de Esperanto, Carry-le-Rouet, proksime de Marsejlo en Provenco.
- La 16an —23an de julio 2027 La 60-a ILEI kongreso. Jenia Góra, Pollando
- 3-a — 10-a de julio 2027 112-a Universala Kongreso de Esperanto, Melbourne, Aŭstralio
- La 15an — 22an de aŭgusto 2027 Internacia Junulara Kongreso, Petzow, Germanujo
- La 21an — 28an de aŭgusto 2027 93-a Itala Kongreso de Esperanto, Crema, Italujo

Ĉu vi organizas interesan aranĝon? Aŭ vi scias pri interesa, precipe internacia aranĝo? Skribu al ni. Eble venonte tie povus esti evento, kiun vi rekomendos.

★

Cetera programo en novembro

La 25an **Fabeloj** – Miroslav Malovec. *Lingvaj ekzercoj*, klubejo

★

Programo en decembro

La 2an **Kion ni legas**. Rakontado pri libroj en Esperanto, kiujn vi legis precipe dum la dua duono de la jaro. *Rete per Jitsi.* Se vi ankoraŭ legis nenion, rapide ion tralegu. Ĉu vi havas nenion por legi? Loĝantoj en Ĉeĥio povas printepreni librojn en Esperanto en Moravia landa biblioteko en Brno (eblas ankaŭ per Interbibliotek pruntservo - ĉeĥe MVS - el iu ajn bibiloteto) aŭ vi povas prunti librojn el Libroservo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio)

La 9an **Antaŭkristnaska renkontiĝo** – Milan Kolka, klubejo

La 16an *Ankoraŭ neagordita. Komuna programo kun klubo el Gliwice, rete per Zoom*

La programo ĝis fino de jaro estas preskaŭ agordita. Restas nur du retaj programeroj. Ni jam komenciĝas prepari programon por la unua kvarono de la vononta jaro. Se vi havas interesan temon, kiun vi volas prezenti, ne hezitu skribu al ni. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos. Dankon.

Esperantista klubo Brno

Bosonožská 323/15, Brno
Czech Republic

Vi recevis la mesaĝon, ĉar vi estas membro de Esperantista klubo Brno, ĝia favoranto aŭ vi petis aboni invitilojn de nia klubo. Se vi ne estas membro de la klubo, vi povas malaboni tiujn mesaĝojn.

Malaboni

